

Kulturaj Kajeroj

E.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 50 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

SEPTEMBRO-OKTOBRO

1981 - 5

KULTURAJ KAJEROJ

1981 SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésilion

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Kio estas folkloro ? B. Cheverry

Pri la pluvo kaj la bela vetero, somere, en okcidanta Eŭropo F. Boyet

La malsuperaj limoj de la lingvoj F. Boyet

Fervoja konstruado en la usona okcidento B. Golden

La arlesanino A. Daudet, trad. A. Ribot

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

La suno brilas sed la vento blovetas malvarmete. La surfaco de la akvo tremetas. Malrapide iras la flosilo farita el la materialo trovita ĉirkaùe en la kamparo. Gi forlasas la insulon sur kiu staras adiaùante la avo kaj aliaj membroj de la tribo. La gejunuloj sur la flosilo ĵetas rigardon al la malproksimiĝanta lando-bordo. Fiere ili staras. Per longa stango li direktas la flosilon dum ŝi rigardas lin per okuloj plenaj je fido sed ankaù je iom da angoro. Kien ? Kien ili iras ? Ŝi estas preta sekvi lin ĝis la fino de la mondo, sed... Ĉu al nekonata lando loĝata de sovaĝaj bestoj kaj kruelaj homoj ? Ĉu al iu mirinda paradizo, kie oraj pomoj kreskus sur la arboj, bestoj petus karesojn kaj dolĉa muziko aùdiĝus venanta el la aero ? Revo forpelas la timon el la junaj okuloj. Kia vivo ili havos en tiu fabela lando. Ne necesos labori por ricevi nutraĵojn, tiel belaj kaj bongustaj estos la fruktoj ĉie pendantaj de la arboj. La tutan tempon ili dediĉos al amo... Tiel revas la junulino kaj ŝi rigardas la junulon. Ŝi revenas al la realo. La junulo parolas. Amplenajn vortojn ? Ne. « Prenu do la hokon ! ».

La flosilo haltis. La gejunuloj ankoraù vidas la lando-bordon sur kiu la adiaùintoj nun metis siajn manojn super la okuloj por atente rigardi. « Prenu la hokon ! Ĉu vi revas ? ». Jes, ŝi revis, mallongan revon. Nun ŝi prenas la hokon, enakvigas ĝin profunden kaj pene eltiras herbojn, kiujn ŝi etendas sur la flosilo. La junulo faras la saman laboron kaj iom post iom amasiĝas la akvo-plantoj, doloras la brakoj, la ŝultroj, la manoj. Iom post iom la flosilo subakviĝas. Kiam la piedoj de la laborantoj baniĝas en la akvo ĝismaleole la junulo diras : « Nun, sufiĉas ». En liaj manoj la stango anstataùas la hokon kaj la flosilo direktiĝas al la insulo, kie denove ariĝas grupeto da tribanoj. Kiam la flosilo albordiĝas, la gejunuloj levas la okuloj al la ĉefo, kiu simple, afable diras : « Bone ».

Kun iom da imagpovo la ĉeestantoj de la unua periodo povis vidi tiun scenon. Matene kaj posttagmeze la ŝipestro Heinrich kaj la gemaristoj sur flosilo farita surloke de ili, elprenis el la lageto la sovaĝajn akvo-herbojn, kiuj pli kaj pli plenigis ĝin. Dank'al ili la akvo estis multe pli pura kaj bonaspekta dum la sekvaj periodoj. Ni ne kutimas doni medalojn al la meritoplenaj homoj sed ni povas doni dankojn, elkorajn.

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso en Brazilo :

Por la kvina ekstereŭropa universala kongreso, 1747 partoprenantoj el 50 landoj kunvenis en Brazilo.

Malgraŭ diversaj organizaj mankoj, la kongreso estis brila manifestacio dank'al la subteno kaj partopreno de eminentuloj.

Bonvenigis la kongresanojn Dro Aureliano Chaves, vicprezidanto de Brazilo, reprezentanto de la Prezidento de la Respubliko, alta protektanto de la kongreso. El la 21 reprezentantoj de registaroj, 14 salutis. Speciala poŝtmarko estis emisiita.

La ĝenerala direktoro de U.N.E.S.K.O. sendis tre amikan mesaĝon. Dum la solena inaŭguro, William Auld, prezidanto de la Akademio de Esperanto, festparolis pri la kongresa temo : « Kulturoj kaj lingvoj — pontoj kaj baroj ».

La estontaj kongresoj okazos en Antverpeno (24a ĝis 31a de Julio 1982), eble en Budapeŝto en 1983, kaj certe en Vancouver (Kanado) en 1984.

De nun, la kongreso de Antverpeno bonege preparigas. La reĝo de Belgio akceptis esti la Alta protektanto. La ministerio de poŝto decidis eldoni specialan poŝtmarkon.

La 38a Internacia Junulara Kongreso okazos en Loveno (Louvain), de la 1a ĝis la 7a de Aŭgusto.

Pri la kongreso de Brazilo, konvenas ankoraŭ mencii ke la programo de la tradicia kongresa universitato entenis dektri altnivelajn prelegojn de diverslandaj fakuloj, sub la prezidanteco de S-ro Paulo Vieira da Silva, profesoro en la universitato de Brazilio.

S.A.T. - kongreso :

Por la unua fojo, la S.A.T. — kongreso okazis en Svisio. 300 anoj, el 16 landoj partoprenis ĝin.

Someraj universitataj kursoj en Lieĝo (Belgio) :

La sesio 1981 de tiuj nepre subtenindaj « universitataj kursoj » okazis tiun jaron pri fakoj pedagogio kaj ekologio.

La programo kaj kromprogramo de sciencaj prelegoj kaj studvizitoj estis tre riĉa. La listo de la kajeroj eldonitaj de S.U.K. entenas nun tridek sep titolojn.

Esperanto kiel doktoriga disertacio en Sorbono :

Fine de Junio, S-ro Lo Jacomo, sekretario de la faka asocio de matematikistoj, doktoriĝis en la universitato de Parizo pri lingvistika fako. La temo de lia disertacio estis esperantologia : « Libereco kaj aŭtoritato en la evoluo de Esperanto ». Lia studo enhavis pli ol 650 paĝojn kaj li laboris sub la gvido de la eminenta lingvistiko André Martinet.

En la ekzamenkomisiono estis, interalie, Prof. Michel Duc Goninaz kiu instruas oficiale Esperanton en la Provenca Universitato en Aix-en-Provence (Francio). Post trihora diskuto kun la kandidato, la komisiono akceptis la disertacion, kun mencio « tre bone ».

La laborplano de la budapeŝta centro de U.E.A. :

Tiu faka centro de U.E.A. pri eldona kaj sciencteknika agadoj jam planis siajn unuajn labormonatojn.

Ĝi preparas du fakajn kunvenojn en Hungario : « Studenta Aŭtuna Forumo » en Szeged (3a — 9a de Novembro) kaj « Internacia Ekonomistika Simpozio » en Budapeŝto (27a de Decembro — 2a de Januaro 1982).

La centro plie okupiĝas pri la kunordigado de kelkaj terminologiaj laboroj : Orienteŭropa varianto de la 9-lingva « Internacia komerca-ekonomia vortaro », 4-lingva « Radio-teknika terminaro », « Fakvortaro de la publika instruado » (trilingva), seslingva « Industria instruado kooperativa fakvortaro ».

La centro ankaŭ faris eldonpropononjn pri diversaj fakaj verkoj. Ĝi, krome, planas transpreni la eldonadon de « Sciencaj komunikaĵoj ».

La seminario de T.E.J.O. en Strasburgo :

Dudeko da junaj geesperantistoj partoprenis la duan seminarion de T.E.J.O. en la eŭropa junulara centro de la Konsilio de Eŭropo, en Strasburgo (31a de Majo — 5a de Junio). La elektita temo estis : « Nova internacia ekonomia ordo » (la nejustaj rilatoj inter la industriaj landoj kaj la tria mondo). La seminario konkludis ke esperantistoj havas sian rolon por informi pri la efektivaj faktoj de la triamonda subevoluo.

Konferencoj en Paderborn :

De la 11a ĝis la 18a de Novembro okazos en Paderborn (Germanio) diversaj manifestacioj ligitaj al kibernetiko, komunikado kaj Esperanto ; laborkonferenco pri lingvaj problemoj en la scienco kaj klerigo ; kolokvo de la laborgrupo « Interlingvistiko » de la « Eŭropa klubo ».

Informas : « Instituto pri kibernetiko », Kleinenberger Weg 168, D-4790 Paderborn.

Esperantista vojaĝo al Ĉinio :

Karavano de esperantistoj vojaĝos al Ĉinio inter la 14a de Aŭgusto kaj la 4a de Septembro 1982, kun antaŭvidataj renkontoj de ĉinaj esperanto-grupo kaj esperantlingvaj gvidistoj.

Informas : N. Durham, 80 Morley Road, Chadwell Heath, Romford, Essex, RM6 6XA (Britio).

La estonta fervojista kongreso :

Ĝi okazos en Balatonfüred (Hungario) inter la 2a kaj la 8a de Majo 1982.

En universitatoj :

— Ĉe la universitato de Lund (Svedio), S-ro Hans Henrikson prezentis doktoriĝan disertacion pri D-ro Zamenhof kaj la religiaj trajtoj en la frua epoko.

— Tricent interesuloj, inter ili 146 gestudentoj, lernas la internacian lingvon ĉe la universitato de Nanjing, en Ĉinio.

« Tintin » (Tinĉjo) en Esperanto ! :

Post « Asterikso », ĵus aperis en la internacia lingvo bilda albumo de la fama serio « Tintin » de la desegnisto Hergé. Temas pri « La krabo kun oraj pinĉiloj ».

Novaj eldonaĵoj :

— « La Luzidoj » de Luis de Camões. Tiu fama klasika verko de la portugala poeto ĵus aperis en la U.E.A. — serio « Oriento — Okcidento ».

— « Fabeloj de la verda pigo » de Louis Beaucaire. Originala verko por infanoj.

Kio estas folkoro ?

Jen demando, ĉu ne ? Demando proponita, lastan someron, al partoprenantoj en kulturaj aranĝoj de Gresillon kiam, en la ĉirkaŭanta regiono, lokaj invitoj al « folkloraj » aranĝoj ne mankis.

Fakte, ne nur en Francio laŭŝajne, same kiel epidemio kiu pli volonte manifestiĝas ĉe printempo kaj somero, iu folkloro pli spektakla ol vere kulture riĉenhava estas prezentata al kuriozema spektantaro okaze de lokaj tradiciaj festoj, foiroj, oficialaj manifestacioj, ofte ankaŭ propagandcele por altiro de multnombraj turistoj. Plej evidente, tiaj prezentoj celas revivigi en okuloj kaj mensoj de generacioj pli alkutimiĝantaj al modernaj kaj bruemaj maŝinoj kaj aparatoj, al artefaritaj redonoj de voĉoj kaj muzikoj, la simplan tutpersonan vivmanieron de praavoj, tio pere de kantoj, dancoj, simplaj muzikiloj, tipaj regionaj kostumoj.

Nedube, la rezultoj ne estas tute senvaloraj kaj plej ofte oni povas konstati ke ili kontentigas ĉiujn : iniciantojn, organizantojn, aktorojn kaj spektantojn. Ja, evidentiĝas ke tiaj elmontraĵoj trovas la deziratan eĥon frunte al tre diversaĝa publiko avida je retrovo de siaj familiaj radikoj, kaj laŭaspkete kontenta fuĝi, dummomente, el rutinaj tro altrudemaj modernaĵoj. Do, bone ! Sed, ĉu ne tro falsaj, sufiĉe ofte, estas la elmontraĵoj kiuj dank'al pli luks- kaj kolor-riĉaj vestoj ol la originalaj, pli bruemaj prezentoj, troigas, degenerigas la esencon, flankenlasas pli diskretajn sed pli aŭtentikajn trezorojn al ni lasitajn de niaj geavoj ? Kiaj trezoroj ? Ni revenu al la demando :

Kio estas folkloro ? Kiun signifon havas la vorto ? Ĉu ni trovos ĝin en la Plena Ilustrita Vortaro ? Jes ! Evidentiĝas ke la vorto, relative nova, laŭdire kreita nur en la 1864-a de la anglo W. J. Thomas, rapide iĝis sufiĉe internacia por, ke el la angla lingvo, oni esperantigu ĝin sen ŝanĝo, kiel faris diversaj landoj, el kiuj Francio : Angle, « folk » signifas : popolo, gento ; « lore » scienco, kono, tiuokaze pri tradicioj, kutimoj kaj, fakte, PIV redonas je la vorto « folkloro » I) Popollegendaro kaj referencas al : eposo, mito, etnologio. 2) scienco pri la tradicio kaj ĝiaj leĝoj ĉe la civilizitaj landoj kaj precipe en la popolaj medioj : du difinoj kiuj kompletigas unu la alian por doni al la vorto sufiĉe ĝeneralan sencon ne nur pri scienco sed ĉefe pri iu formo de civilizacio, de humaneco kies imponeco, dum tre longe ne aspektis ege grava ĉar, unuavide, tro simpla : simpla kiel ĉiutaga vivo mem kiu postulas senĉesan ripetadon de samaj plej naturaj gestoj kaj agoj.

Tamen, laŭlonge de la jarcentoj, sen uzi la vorton « folkloro », esprimo ankoraŭ ne konata, plej kleraj historiistoj, verkistoj kaj poetoj elĉerpis el popularaj trezoroj por subteni kaj bone situi konkretajn faktojn. Aliparte, oni ne devas forgesi ke oftege antikvaj civilizacioj restis — ankoraŭ restas — pli vivantaj ĉe niaj okuloj kaj mensoj ne tiom per gravaj verkoj, kiom per desegnaĵoj de simplaj homoj retrovitaj, ĉu hazarde, ĉu okaze de arkeologaj traserĉadoj : Ja, vido aŭ redono de naivaj desegnaĵoj sur kavern-vandoj pli frapas okulojn kaj memorkapablon de ne specialistoj, ol gravaj pritemaj verkoj. Antikva Egipta civilizacio ekzemple, estas pli konata de nunaj popolamasoj pere de pentraĵoj, hieroglifoj, objektoj retrovitaj en tombejoj, ol per rakontoj de Heredoto ! Paralele, oni povas konstati, ke laŭlonge de la jarcentoj, simplaj transdonoj, de buŝoj al oreloj, per naivaj rakontoj aŭ kantoj, eposeoj pri amaj, heroaj, religiaj faktoj tamen instruis pri antaŭaj vivmanieroj kaj gravaj eventoj popolamasojn kiuj grandparte kaj dumlonge ne scipovis legi kaj havis por vidi nur rarajn desegnaĵojn aŭ skulptaĵojn !



Sed ni ne kredu ke se, fakte, la medio plej favora al transdono de folklораĵoj esence estas kampara, el ĝi fontis kaj vivis nur maldelikataj trivialaĵoj. Tute ne ! Flanke de propraj kamparaj vivredonoj ege piaĉis al vilaĝanoj legendoj, heroaĵoj, kantoj, vest-imitadoj, ili originantaj el nobelaj aŭ burĝaj fontoj. Sed, ĉe epoko kiam neriĉulo havis neniajn eblecojn, monajn aŭ praktikajn, por translokiĝi, kiam estis nek fervojoj, nek motorveturiloj, cetere ankoraŭ ne konvenaj tervojoj kaj neniaj aŭd-vidaj transdoniloj, natura tendenco emis al najbaraj interrenkontiĝoj por, ĉefe vintre, gaje plilongigi tagojn ne tro lacigantajn ĉar mallongajn. Tiam la gejunuloj esprimis siajn altirojn al movplenaj distroj per dancoj, kantoj, muzikoj, kiam la maljunuloj tre ŝatis ĝui iun sukcesoп rakontante historiaĵojn el la pasinta tempo. Tiel, venis al ni sendifektita verkaro, daŭre riĉigita, kolektita en malnovaj kajeroj aŭ libretoj transdonitaj de generacioj al generacioj : Verkaro rilatanta ne nur al kantoj aŭ rakontoj sed, plej praktike, al receptoj plej diversaj, al sanstato kaj kurac-rimedoj kelkfoje pli, malpli magiaj, al meteorologiaj observadoj kaj iliaj aplikadoj, al utilaj konoj pri familiaraj bestoj, ilia sinteno diversokaze kaj farto, ankaŭ pri la ĉirkaŭanta danĝera bestaro, pri plantoj kultivataj kaj sovaĝaj.

Al familiaj kaj individuaj tradicioj, oni povas aldoni pli amasajn homrenkontiĝojn kaj ritojn. Pere de valoraj kolektaĵoj, multaj el niaj provincaj muzeoj povas rekrei por ni malnovajn mediojn, laborkondiĉojn, kutimojn el pli, malpli foraj epokoj.

Daŭrigante niajn traserĉadojn pri folklораĵoj, oni povas, plej logike, klasifiki ilin laŭ hom-vivdaŭro, t.e. de la naskiĝo al la entombejo. El familiaj arkivoj aŭ malnovaj rakontoj, facile troveblaj estas anekdotoj kiuj rilatas al kredoj, antaŭjuĝoj, superstiĉoj eĉ al populara medicino kiam temas pri gravedeco, akuŝo, naskiĝo, baptofesto. Se la unua enkondukis gravajn demandojn, aŭgurojn, eventualajn prov-elektojn, pli malpli sukcesajn rilate la bebo-sekson, ne mensogaj povis esti la preĝej-sonoriloj kiam okaze de la baptofesto, en la pasinteco tre frua post la naskiĝo, oni anoncis ĝin al la ĉirkaŭantaro pere de sonkodo de ĉiuj konata. Ankaŭ ne similaj estis, ekzemple en Anĵu, la koloroj de la bebaj vestaĵoj, bluaj por vir-seksaj, rozkoloraj por inaj. Same por la draĝeoj, kiujn pli malpli abunde, laŭ la mon-eblecoj de la baptopatroj, oni disĵetis, fine de la bapto-ceremonio, al infanaro kiu ne volis manki bonan okazaĵon, ĉefe kiam, de la

sendantoj, estis atenditaj moneroj kune kun la bombonoj. Post la akuŝo — ĉiam en Anĵu — estis nepre konsilinde enterigi la umbilikan ŝnuron ĉe la piedo de rozarbeto, kies flor-koloro, laŭ la deziro de la patrino, estos transdonebla al la beba vizaĝo.

Sed, tute malkonsilinde estis la enfosado de la umbilika ŝnuro ĉe piedoj de vinbertrunko se oni volis eviti, ke la infano iĝu drinkemulo ! Kaj de la tuta unua jaro, oni ne devis eltranĉi la ungojn de la bebo por, samtempe, ne randetranĉi ĝian inteligentecon kaj malebligi, ke ĝi iĝu ŝtelisto ! Laŭlonge de la infan-kreskado ne mankis kultoj al sanktuloj-kuracantoj, al popularaj medicinoj kaj farmakopeoj, al ludoj kaj, kiam adoleskantoj al junularaj festoj kaj ludoj. Pri gefianciĝoj kaj edziĝfestoj restas multege da kantoj, dirafoj, aŭguroj, iom da sorĉafoj, iom da medicino. Kaj pri la baldaŭa geedza kunvivado kiom da aŭguroj bonaj kaj malbonaj, da agoj ne farendaj.. Okaze, tiuj-ĉi povis almenaŭ motivi fuŝadon en postaj geedzaj interrilatiĝoj Kompreneble, fianĉ- kaj edziĝ-festoj havis siajn proprajn ritojn rilate la ceremoniojn, la sekvantajn abundajn manĝaĵon kaj noktan balon. Sed, nepre, oni ne devis geedziĝi dum Majo por ne riski havi frenezemajn infanojn.

Pri morto estis pli simple : sufiĉis reveni al tre malnovaj ankritaj kutimoj pri funebraj ritoj, kostumoj, invitoj, kunmanĝoj. En la domo mem, krom la zorgoj al la ĵus mortinto, oni devis, omaĝe al ĝi, el la nepra provizejo, eltiri konvenajn ujojn, benitan akvon, krucifikson, branĉeton de seka laŭro aŭ bukso benita je la lasta Palmoferto, haltigi la grandan horloĝon vualigi aŭ returni la spegulojn, iri al la abelujoj por, al ili, alkroĉi nigran krepŝrubandon, ĉar de niaj kamparaj prapatroj, abelaro estis konsiderata kiel flanka familio, oferema je valoraj donacoj sen postuli pri si mem. (Cetere, ankaŭ okaze de baptoj kaj edziĝfestoj oni dekoraciis la abelujojn sed, tiajokaze pere de brilkoloraj bukedoj kaj rubandoj). Nepre, al la funebra manĝo oni devis inviti plej proksimajn najbarojn, kiuj tie ricevis honor-lokon. Ja, en niaj kamparoj, ege gravis la najbareca konstanta helpado, okaze multe pli valora ol tiu de pli malproksimaj familianoj.

La familia ĉiutaga vivo ankaŭ postulis grandan atentemon al kalendaraj ceremonioj, al agrara ciklo : semotempoj, cereal- kaj vin- aŭ frukt-rikoltoj, ĉiuj enkondukantaj tradiciajn kutimojn. Se religioj havis bazajn oficialaj ritojn, tie kaj tie, niaj kamparanoj havis por flankenaldoni pli malpli paganajn kutimojn. Aliparte, plej volonte, laŭlonge de la jarcentoj, ili kreis kaj dediĉis lokojn ne nur al Sankta Virgulino sed ankaŭ al sanktuloj ofte ne konataj aliloke. Al ili oni preĝis laŭ la atribuita kurac- aŭ don- povo asertita de antaŭaj dankemuloj : Ni estu komprenemaj ! Estis ĉe epoko kiam ne ekzistis sociaj leĝoj aŭ asekur-medicino, kiam tre raraj kuracistoj ne disponis pri gravaj rimedoj, frunte al ne riĉaj popoloj. Se la nunaj generacioj ne plu konas tiujn sanktulojn kaj iliajn apartajn povojn, tamen la lokoj kaj figuroj restas.

Alian fakon, oni povus nomi « natura folkloro » ĉar rilatanta al kredoj kaj kutimoj pri ĉielo, tero, homa naturo, plantoj, bestoj. Ĉiela folkloro, tiu-ĉi plej praktika, pritraktas popularajn observadojn enkondukantajn meteorilogiajn asertojn, cetere daŭre uzatajn. Ni citu, ekzemple, la lunan cirklon kaj elekton de konvena fazo por prisemado, pritondo de arboj kaj vitoj... eĉ de homaj haroj ! En la folkloro pri tero, oni povas lokiloka ŝtonojn, la megalitajn monumentojn kiuj posedas siajn proprajn legendojn aŭ superstiĉojn ; la miraklajn fontojn kies akvoj kuracis diversajn malsanojn, la kamparan flaŭron el kiu plantoj havis — ankoraŭ havas — samajn povojn, la birdajn voĉojn kaj ties signifojn la interrilatojn kun bestoj kaj ties aŭguroj ; kaj ni alvenas al folkloro de la homa naturo, tiel korpa kiel mensa, al la magio kaj sorĉaĵoj kiuj, en la pasinteco, ludis tiel gravajn rolojn, ne nur en Anĵu. Tamen, ĉi-loke, oni povas retrovi, en kamparaj ŝrankoj konservitajn de sinsekvantaj heredantoj, magiajn formulojn por elpeli el vivanto, ĉu maisanon, ĉu malbonan spiriton. Flanke de tenebraj rakontoj, pri sorĉistoj, ekzorcistoj, ankaŭ oni povas trovi historiojn pri fabelaj estaĵoj duon-homaj, duon-bestaj, kiuj dum jarcentoj teruris, kelkfoje kontentigis, niajn praavojn, kiel lup-fantomoj, sorĉistinoj bonaj aŭ malbonaj, dancantaj fajroj aŭ lumoj, strangaj bruoj aŭ krioj. Tiaj arkivoj restas skribataj en la regiona lingvo kaj ankoraŭ restas geavoj por legi ilin laŭ la tiama akcento.

Ni alvenas al alia formo de folkloro, plej alloga al ĉiuj socio-klasoj, kamparaj aŭ urbaj : Estas la ĉiutempa, populara literaturo ; tiu de la fabeloj, legendoj, mirrakontoj, historietoj, hagiografioj, eĉ sciencaj verkoj kiuj reenirigas nin en pasintajn tempojn kaj vivmanierojn. Nedube, populara historio, kiam bazita sur aŭtentikaj dokumentoj iĝas bazo plej utila al bona komprenemo de studlibroj aŭ dikaj histori-verkoj. Kiel ekzemplo, oni povas citi la francan mezepokan literaturon t.e. inter la 9-a kaj 14-a jaro. El ĝi restas malmulte ĉar je tiu epoko, ag-kantoj, heroaj eposoj, plej ĝenerale estis diskonigitaj nur parole de vagantaj trobadoroj aŭ foir-amuzantoj. Tamen, de buŝoj al oreloj, de kasteloj al kabanoj, ili konsistigis tiaman literaturon al kiu oni povas aldoni la tre simplajn, kelkfoje naivajn rakontojn kutime kaj senlace redonitajn en ĝojaj interrenkontiĝoj. Tiaj dirafoj rekreas por ni la menson de niaj ĉi-epokaj praavoj kiuj bone sciis miksi maldecan ridon al feina kreado aŭ heroaĵo, fidelecon al unu princo sed mokemon al ĉiuj potenculoj : konstanta reago de sub- al super-uloj ! Cetere tiuj rakontoj, tre spontanaj, ne celis al moraligado. Pli simple ili redonis hom-sintenon frunte al pli, malpli strangaj okazaĵoj, kaj, multe pli poste, famaj verkistoj sciis, el tiaj fontoj, rekrei literaturon aŭ teatraĵojn. De la 18-a jarcento, kiam industri-progresoj permesis pli larĝan disvastigadon de presaĵoj, je modera prezo, al pli kaj pli multnombraj homoj scipovantaj legi, oni povas konscii kiel frua populara literaturo, el naiva kredo, povis samtempe esti riĉa, varia, originala, vivoplena. Same, pri la popularaj kantoj kaj dancoj kiuj konsistigas la plej orel- kaj okulfrapajn flankojn de folkloro, konservitaj, transdonitaj laŭlonge de la jarcentoj kaj, de kelkaj jaroj, pli amplekse diskonigitaj por ne diri ekspluatataj.

Kial tia konstanta altirado ? Nedube ĉar vivantaj hom-esprimoj, mov- kaj bru-plenaj altiras ĉiujn homojn, de la pli frua juneco per lul- kaj rond-kantoj ĝis maljuneco kiam kantadetoj emas rekrei etoson de la junaj jaroj, laŭ diversaj temoj : amo kaj amoro, trink-kaj danc-kantoj, kantoj de rekrutoj kaj soldatoj... multaj aliaj kaj, por ĉiuj, Kristanaj himnoj.

Ŝajnas, ke oni ne povas silenti pri multe pli serioza, regiona, socia folkloro kies rigidaj reguloj, dum jarcentoj superregis la rilatojn inter majstroj kaj servistoj, proprietuloj kaj luprenantoj, komercistoj kaj klientaro, eĉ inter najbaroj. Aliajn aspektojn estis alportataj de artoj specife regionaj, tiel pri konstruaĵoj, meblaro, fajencaĵoj kiel pri ŝtofoj, brodaĵoj, vestaĵoj : Aparte tipaj estas la Anĵuaj kostumoj, ĉefe la virinaj kufoj. Ĉiuj-ĉi art-modeloj el la pasintaj tempoj estas videblaj en niaj lokaj muzeoj kiuj, certe, povas multe instrui pri regiona folkloro, kaj tio en la tuta mondo.

Ni finos per nova prilingva vidpunkto rilatanta al la vorto mem « folkloro », kies puran sencon mi povis klarigi komence de tiu prezento. Ve ! multaj lingvistoj, aŭ puristoj, plendas pro la tro ofta malbonuzo de la vorto kiu, tiel, ne plu estas konforma je la logiko. En la franca lingvo, nun, volonte oni uzas esprimojn en kiuj la vorto « folkloro » sugestas pri io stranga, bizara, kelkfoje ridinda... Espereble, la ĉi-supraj klarigoj konvikis vin pri la kontraŭo. Se jes, dankon !

B. CHEVERRY.

Pri la pluvo kaj la bela vetero, somere, en okcidenta Eùropo

KIO ESTAS « BELA » VETERO ?

Tiu nocio estas tre relativa. En regionoj duondezertaj, la pluvo estas la favora vetero, kaj por la uzantoj de velŝipo, vetero estas bona, kiam la vento estas sufiĉe forta. Tamen plej kutime, en la someroj de okcidenta Eŭropo, oni nomas bela la veteron, kiu permesas promeni, ekskursi, organizi plenaerajn festojn... tio estas ĉielo sennuba, tago kaj vespero sen pluvo kun iom da venteto por mildigi la varmon de la suno. Oni ankaŭ devas taksi la malsekecon, ĉar por esti komforta la aero devas esti meze humida (humideco estas proporcio de akva vaporo en atmosfero). La varmo venas al la homo de la suno per luma radiado, sed ĝi foriras de la korpo per nevidebla radiado (transruĝa), kiu ne facile trapasas la tro humidan aeron ; tial la homo sentas varma iun aeron je 35°C, kiam ĝi estas tre humida (100 %), dum ĝi sentas malvarma iun aeron je 15°C, kiam la humideco estas 20 % (« seka » klimato). En Francio, la meza humideco estas inter 50 % kaj 90 %, en tiu kondiĉo la agrabla temperaturo de « bela » vetero ĉirkaŭas 25°C. De nun, kiam ni parolos pri bela vetero, temos pri vetero agrabla por ferianto.

LA ĜENERALA KLIMATO DE OKCIDENTA EUROPO.

Eŭropo situas en unu el la mezvarmaj zonoj de la terglobo, kaj pro tio oni povus kredi, ke ĝia klimato estas ĉiam meza inter varmo kaj malvarmo, konstante milda kaj agrabla.

Sed tio estas nur naiva ŝajno, la reala situacio estas tre ofta ŝanĝo, kaj mildecon anstataŭas nestabila ekvilibro inter periodoj varmaj aŭ malvarmaj, fazoj sekaj aŭ pluvaj, ventoj kies direktoj kaj rapidecoj senĉese ŝanĝiĝas.

Ni ĉiuj scias, ke varma aero estas malpli densa ol la malvarma kaj tendencas altiĝi : tial, en la plej varmaj regionoj de la terglobo, la premo de la atmosfero estas relative malforta ; kontraste, en malvarmaj polusaj regionoj, la premo de la malvarma aero estas grava. Laŭ tiu simpla regulo, ventoj devus blovi senĉese, en la altaj tavoloj, de la ekvatoro al la polusoj, kaj apud la tersurfaco de poluso al ekvatoro. Sed tiu leĝo estas nur parte vera ; oni konstatas, ke, je la nivelo de la tropikoj, la varma aero parte malaltiĝas, (konsekvence, estas grava atmosfera premo) kaj ke tiu falinta aero dividiĝas en du partoj. Unu parto reiras al ekvatoro (alizeoj), dum la alia iras norden (en nia norda nemisfero) renkonte al la malvarma aero, kiu, laŭ la ĝenerala regulo, fluas de la nordo suden. Tiuj du fluoj, unu kiu venas de la tropiko kaj estas varma, kaj la alia, kiu venas de la poluso kaj estas malvarma, renkontiĝas en la tiel nomataj « mezvarmaj regionoj », kiuj estas la luktejo de tiu senĉesa konflikto inter varmaj kaj malvarmaj fluoj.


Sed tiu skemo estas ankoraŭ tro simpla. Je la tropika latitudo ne ekzistas kontinua linio de fortaj premoj, sed pro la influo de la oceanoj kaj de la kontinentoj, sinsekvo de centroj, kie la premo estas maksimuma, kaj kiujn la meteologoj nomas anticiklonoj. Krome, pro la rotacio de la tero, ĉiu fluo, en la norda atmosfero, tendencas turniĝi dekstren (en la suda maldekstren). Tial, el la centro de ĉiu anticiklono fluas ventoj kiuj kirliĝas dekstren kaj eksteren. Kompreneble, oni ne devas forgesi la renkonton de varma aero kun malvarma. Pro la denseco, la malvarma aero tendencas flui sub la varma, tiel naskiĝas la « perturboj », kiuj cirkulas de okcidente orienten kaj kies limoj estas nomataj frontoj. La varma fronto antaŭas la perturbon, kiam la varma aero anstataŭas la malvarman, kaj poste, je la fino de la paso, kiam la varma aero anstataŭas la malvarman, kaj poste, je la fino de la paso, kiam la malvarma aero revenas post foriro de la varma, estas malvarma fronto.

Resume, la klimato de okcidenta Eŭropo estas regata de la kaprica vicirado de la perturboj.

LA BELA SOMERA VETERO.

La unua karaktero de bela vetero estas la pureco de la ĉielo, kaj tiu zorgo kondukas al la demando : kiel formiĝas la nuboj ?

Kiam la aero varmiĝas, ĝi supreniras, kiel ni jam vidis, la premo malfortiĝas, sed oni devas scii krome, ke ju pli la aero estas varma, despli ĝi povas enteni humidecon sub vapora formo. Ĉiuj scias, ke kiam homo elspiras en somera aero oni vidas nenion, spite al la akva



Sekco de la perturbo laù la vertikala ebeno montrata per "A-B" sur la antaùa mapo.

vaporo, kiu fluas al la pulmoj, kontraŭe, en malvarma vintra aero, aŭ kontraŭ malvarma vitrajo, tuj la akvo de la vaporo fariĝas nebuleto, tio estas akver-aro, antaŭ la buŝo. La sama fenomeno okazas kiam varma malseka aero iras de super ia maro al la flanko de malvarma montaro : nuboj formiĝas.

Por ke la aero restu sennuba necesas, ke la fluo de la aero estu de supre malsupren, tiam la temperaturo de la aero plivarmiĝas kaj ne povas okazi likvado de la vaporo. Sed samtempe, pro la fluo, la premo grandiĝas, tial, kiam la atmosfera premo estas plej granda, oni skribas sur la barometroj : « bela vetero ».

Rilate al la somera klimato de okcidenta Eŭropo, ĉio estas direktata per zono de alta premo, kiu kutime estas en la regiono de Acoraj insuloj : la acora anticiklono. Oni klarigis antaŭe kiel ekzistas anticiklonoj en la tropikaj regionoj, sed neniu ĝis nun scias la detalan kialon de la movoj de tiuj anticiklonoj, kaj pro tio oni ne povas antaŭvidi la veteron. Kiam la acora anticiklono estas en sufiĉa proksimeco de Eŭropo (relative norde), tiam tiu amaso de varma premanta aero pelas pli norden la perturbojn, kiuj cirkulas de okcidente orienten, kaj la Eŭropaj landoj ricevas « belan » veteron.

En tiaj cirkonstancoj, ĉu la ĉielo estas ĉiam sennuba ? Ne tute. Unuflanke, oni povas vidi la randojn de la perturboj tio estas altaj nuboj el glacio : la cirusoj. Aliflanke, kiam parto de atmosfero estas pli varma ol la ĉirkaŭanta aero, tiam ĝi plialtiĝas kaj pro tio malvarmiĝas... kaj parto de la vaporo kondensiĝas en nubon. Tiu nubo plialtiĝas ĝis la momento kiam ĝi renkontas aeron pli varman, kiu premas malsupren kaj tiel haltigas la nubon kiu restas flosanta. Tia nubo estas kumuluso, malgranda ; la fakuloj nomas ĝin « humila », sed pli praktike oni diras : kumuluso de bela vetero.

LA MEKANISMOJ DE LA MALBELAJ VETEROJ.

Tiu plurelo devenas de la diversaj kaŭzoj de la malsimilaj malbelaj veteroj.

La plej simple klarigebla estas la tro suda situo de la acora anticiklono, kaj tio estas ĝuste la kontraŭo de la antaŭa priskribo. Tiam, je la nivelo de Eŭropo, pasas senĉese sinsekvo de perturboj. Kiam iu perturbo aperas, per ĝia varma fronto, la temperaturo sur la surfaco de la tero plialtiĝas post apero de la plej altaj nuboj : la cirusoj. Post la horizontalaj tavoloj de la stratusoj, venas la pluvo kun la nimbusoj kaj la varmiĝo de la aero. Tiam la ĉielo estas tute griza, kaj la pluvo, regula, povas daŭri sufiĉe longtempe. Kiam la perturbo foriras, venas malvarma fronto, la temperaturo malvarmiĝas, kaj novaj pluvoj okazas, sed per aliaj nuboj kiuj pli similas al kumulusoj, kaj la pluvo estas malregula, ĝi povas esti forta sed nedaŭra, aŭ en ripetitaj faloj. Kun aliaj cirusoj malaperas la perturbo.

Sed en la somero de Eŭropo okcidenta alia situacio prezentiĝas. Tiam, la anticiklono estas sufiĉe norde, je la latitudo de Britio kaj Francio, sed sur la oceano. Se, samtempe, en meza Eŭropo estas varma vetero, kaj pro tio aero de malforta premo, oni diras ankaŭ « ciklono », tiam laŭ la leĝoj ĝeneralaj jam citita, kreiĝas fluo de nordo al sudo inter la du regionoj, tio estas sur okcidenta Eŭropo. Por la feriantoj tia vetero estas tute aĉa, ĉar la malvarmo de la aero aldoniĝas al la pluvoj.

Tria formo de malbela vetero povas okazi meze de belvetera periodo. Ni scias, ke pluvo fontas el malvarmigo de humida aero, ni jam parolis pri malvarmigo kontraŭ la montoj, kontraŭ la malvarma aero kiu ĉirkaŭas la perturbojn, sed malvarmigon povas kaŭzi vertikalaj movoj en la atmosfero, kaj oni tiam paroias pri konvektaj pluvoj. Ni jam aludis al tiaj movoj, okaze de la priskribo de la belveteraj kumulusoj. Se temas, ne pri malmulte da aero kaj malgrandaj diferencoj inter la temperaturoj, sed pri grandaj diferencoj inter la temperaturoj kaj grandaj amasoj da aero, tiam la konvektaj fortoj estas tiel gravaj, ke la fluo transiras la tavolojn pli varmajn kaj atingas grandajn altitudojn. En tiaj cirkonstancoj, la akvo en la aero estas likva, superfandiĝinta, malgraŭ la temperaturo kiu povas esti je -30° C. Tiu akvo estas en nestabila ekvilibro, kaj sufiĉas kelkaj polveroj por ke formiĝas kristaleroj de glacio. Pro fizika diferenco de la premoj, la akvo transiras per vapora formo de la likva stato al la glacia, kaj la glacieroj rapidege kreskas... kaj falas. Se la eroj estas malmultaj, ili multe grandiĝas kaj falas sub formo de glacio : estas hajlo. Se la eroj estas pli multaj, ili malpli grandiĝas kaj fandiĝas dum la falo (kiu povas esti pluretapa pro la movoj de aero kaj diseriĝo de la gutoj), kaj tiam estas pluvo ĝenerale abunda sed ne daŭra. Tiu fenomeno de pluvo pro lokaj cirkonstancoj, meze de bela periodo, en grandaj konvektaj movoj de aero en nestabila situacio, aperas kutime kun ventoj kaj fulmoj. Tial en esperanto, tiuj konvektaj pluvoj estas nomataj aŭ « ŝtormo » pro la vento, aŭ « fulmo-tondro » pro la elektraj fenomenoj.

LA ANTAŬVIDO DE LA VETERO PER LA METEOLOGIO.

La antaŭeco de la meteologiaj anoncoj dependas de la cirkonstancoj. Kiam la anticiklonoj estas senmovaj, la vetero samtipas dum pluraj tagoj, kaj eĉ kiam temas pri cirkulado de perturboj, la modernaj komputoroj permesas anonci la veteron ĝis kvin tagoj antaŭe. Sed kiam la anticiklonoj moviĝas, laŭ leĝoj ankoraŭ nun ne konataj, tiam la meteologoj povas anonci la veteron nur 24 horojn antaŭe, kaj okazas ke, eĉ en tiu daŭro oni riskas eraron.

Kvankam ekzistas multaj instalaĵoj meteologiaj, ne nur en Eŭropo sed sur la oceano, tamen la nombro de tiaj instalaĵoj estas nesufiĉa. Sed la plej nova kaj efika observejo estas nun la satelitoj por meteologio, kiujn oni povas nomi meteosatelitoj. Antaŭ kelkaj jaroj, la Eŭropa spaca agentejo instalis sateliton fikse super la punkto nulo de la teraj koordinatoj, kaj tiu satelito dufoje ĉiuhore sendas bildon de la terglobo. Sed tiu bildo estas pli ĝuste bildaro, ĉar al la tradicia bildo aldoniĝas du transruĝaj bildoj. La unua, kies ondolongo estas ĉirkaŭ 11 mikrometroj (11×10^{-6} m) informas pri la diversaj temperaturoj de la tero, de la maro kaj ankaŭ de la nuboj (kaj tiel oni taksas ilian altecon). La dua, kies ondolongo ĉirkaŭas 6 mikrometroj (6×10^{-6} m) montras la humidecon de la aero, ĉar tiu radiado estas absorbita de la akva vaporo. Sur bildo nigra kaj blanka, ju pli la koloro estas blanka, des pli la aero estas humida. Oni ankaŭ povas, per tiu lasta bildo lokalizi la frontojn inter la diversaj aeramasoj, ĉar ekzistas ĉiam seka linio super la limo inter aeramasoj. Oni tiel povas bone observi la movojn de tiuj aeramasoj... sed oni ĝis nun ne komprenis la kialon de tiuj movoj.

Tial oni lanĉis, mondskale, programon por ĝeneralaj serĉoj pri atmosfero. La informojn oni kolektos en Stokholmo, kaj oni devos studi ilin dum pluraj jaroj antaŭ ol konkludi. La celo de tiuj programoj, ĉar al la ĝenerala tutmonda programo aldoniĝas « regionaj programoj » (ekzemple pri la hinda musono, la interŝanĝoj inter polusaj kaj mezvarmaj zonoj k.t.p.) estas pliperfektigi ia antaŭscion pri la vetero. Oni esperas pri dusemajna antaŭvido, kun koeficiento pri fidebleco, pro la hazardo, kiu restas en tiaj fenomenoj, hazardo, kiun oni esperas kalkuli.

F. BOYET
(prelego - Grésillon 1981)

La malsuperaj limoj de la lingvoj

Esperanton oni akuzas pro artefariteco, kaj la esperantistoj rebatas, ke ĉiuj lingvoj estas soci-devenaj, neniu estas « natura ». Sed ĉu io estas natura, kaj kio ? Aliflanke, la pedagogoj asertas, ke la lernado de lingvo, eĉ la unua, grave dependas de la influo de la medio, sed kio ne venas de tiu medio ? Fine, oni multe parolis pri eksperimentoj kun ĉimpanzoj kaj rapide konkludis pri la kapablo de tiaj bestoj lerni iun per-signan lingvon. El tiuj tri zorgoj oni povas provi studon, unuflanke de la evoluo de la lingvo ĉe la kreskanta individua homo, kaj duaflanke studi la aperon de vera lingvo en la evoluo de la specioj, kiuj plej najbaras al la nuna homo.

La naskiĝo de lingvo ĉe la infano.

La aŭda periodo.

Antaŭ kelkaj jaroj, laŭ la tradicio, oni nomis lingvo nur la unuajn kompreneblajn vortojn diritajn de infano je aĝo inter dek kvin kaj tridek monatoj. Sed antaŭ proksimume dek jaroj oni juĝis, ke tiu fenomeno ne estas la unua, sed nur unu el la diversaj fazoj de lingva evoluo ĉe individuo. Ekde la unuaj monatoj, eĉ la unuaj semajnoj, la bebo kapablas distingi la diversajn sonojn antaŭ ol kapabli elsendi siajn proprajn. Oni malkovris, ke kiam la bebo estas nur unumonata, ĝi kapablas distingi la silabojn kiel povas plenkreskulo uzante la daŭron de la prononco. Laŭ tiuj daŭroj, mezuritaj en milonoj de sekundoj, oni povas distingi /d/ de /t/ kaj /b/ de /p/. La plej fruaj distingoj rilatas al la voĉeco de la konsonantoj, ekzemple la voĉa /b/ de la senvoĉa /p/. Tiuj eksperimentoj, sisteme faritaj kun sufinfanoj el medioj kiuj diferencas kaj per la lingvo kaj ankaŭ per la sociklereco donis ĉiam samajn rezultojn. Laŭ Jacques Mehler (Jak Meler) de la « domo de sciencoj pri homo » en Parizo, tre probable ekde la naskiĝo funkcias la rimedoj, kiuj permesas distingi la parolajn sonojn de la muzikaj, laŭ la fakto, ke en muziko la sonoj estas kontinuaj dum en parolo ili estas senĉese interrompitaj. (Oni facile povas konstati tion malrapidigante sonbendon, tiam oni aŭdas la interrompojn kiuj estas tre mallongaj en la kutimaj cirkonstancoj). Krome, tiuj kelksemajnaj infanoj kapablas percepti la altecon kaj la intensecon de la sonoj, kaj dank'al tio ili distingas la « tonon » de la voĉo. Kiam ĝi estas eksperimente « sentonigita », ili ne rekonas la voĉon de la patrino. Kompreneble, eĉ se ĉiu bebo kapablas aŭdi ĉiun lingvon, ĝia estonta kapablo por paroli fontas en la riĉeco de la voĉaj sonoj aŭdataj en la unuaj monatoj de la vivo ; tiel formiĝas la « patrina » lingvo.

La unuaj voĉaj sonoj.

Post la daŭro kiam la bebo nur aŭskultas venas le tempo, kiam ĝi kapablas ekbabili ; tio komenciĝas post kelkaj semajnoj kaj daŭras plurajn monatojn. Dum tiu periodo la bebo interŝanĝas kun la medio dialogon bazitan sur gestoj, ridetoj, mimikaĵoj kiuj inkludas la tutan korpon kaj kie miksiĝas la unuaj voĉaĵoj. Antaŭ la sesmonata aĝo, tiuj voĉaĵoj estas nur provaĵoj. Ŝajnas, ke la bebo ekzercas siajn voĉajn organojn kaj por la vokaloj kaj por la konsonantoj, kies prononco funkciigas pli ol cent ĉirkaŭbuŝajn muskolojn. En la dua parto de tiu periodo, tio estas inter la aĝoj trimonata kaj sesmonata ; la bebo mem iniciatas la babiladon, kiu restas infanbabilado (necesus uzi fakan terminon pri tia babilo, kiu tute ne similas al tiu de la plenkreskulo).

Iom post iom, ĉirkaŭ la sesmonata aĝo, la bebo transiras de babilo al eĥolalio, kie ĝi ripetas la silabojn, kiujn ĝi aŭdas, kaj iom post iom diferencigas. Oni aŭdas en tiu periodo la sonojn /p/ kaj /b/, ankaŭ /m/, /n/, /s/, /f/ uzataj kun vokaloj kaj spite al la venonta lingvo, la plej oftaj sonoj estas « pa », « ma » « da » « mu » k.t.p. Dum tiu eĥolalia periodo, ĉirkaŭ la fino de la unua jaro, la bebo duobligas, eĉ triobligas la silabojn : papa, mama, bababa...

Tiam la bebo plezure imitas sin mem kaj longe ripetadas sonĉenojn. En la urbo « Besançon » (Bezacon), temis pri francaj beboj, oni povis montri, ke por deksepmonataj infanoj, iuj ĉenoj estis asertaj dum aliaj estis demandaj aŭ neaj. Kompreneble, oni interpretis dank'al la cetero de la situacio, kaj helpe de la gestoj. En tiu periodo la voĉaj produktaĵoj estas akompanataj de diversaj gestoj, kiuj permesas interpreti la formon de la mesaĝo, kaj aparte la tonon de la sonĉenoj. Oni rimarkos, ke tiu akompano de gesto al la parolo daŭros dum longaj jaroj, kaj eĉ la tutan vivon.

La bebolingvo.

Kiam la bebo estas unujara, tiam ĝi ne kapablas uzi vortojn, sed ĝi jam dialogas kun la medio ; ĝi versaĵne multe kapablas aŭdi, eĉ kiam ĝia parola nivelo restas malalta. Tiam oni konstatas, ke la parolantoj de la medio provas uzi specialan lingvon por la beboj, kaj strange, tiu bebo-lingvo estas la sama por la diversaj lingvoj de la mondo : angla, araba lingvoj, sed ankaŭ lingvoj de nordamerikaj indianoj (komanĉa lingvo) aŭ de siberio (ĝiljaka lingvo). Tiu bebolingvo estas miksaĵo de gestoj, mimikaĵoj kaj nur kelkaj vortoj, kie la silaboj ripetiĝas, kaj frazoj, kie oni neniam trovas rilativan propozicion. Oni plie konstatas, ke la bebolingvo uzata de la patro ne estas tiu de la patrino aŭ de iu pliaĝa frat (in) o, kaj tiu lingvo evoluas kun la lingvo de la bebo mem ; ĝi estas « pedagogia » lingvo. Cetere, oni devas noti, ke la bedo aŭdas ne nur la bebolingvon, kiun oni direktas al ĝi, sed ĝi ankaŭ aŭdas la lingvon de la plenkreskuloj kiuj parolas inter si, kaj tio estas grava kaŭzo de la evoluo

La unuaj frazoj.

La lingvo produktita de la bebo mem entenas nur kelkajn vortojn, kiuj komence, estas uzataj anstataŭ diversaj frazoj. Ekzemple, se bebo diras : « dodo », tio povas signifi : « mi deziras dormi », aŭ « mi jam dormis kaj kontentas pri tio », aŭ « mi deziras iri al la lito sed ne dormi » aŭ tute malsimile : « mi vidas. ke la avo dormas ». Je tiu stadio, la bebo ne uzas vortojn, sed ĝi uzas sonojn kiuj havas frazan signifon. Oni pro tio uzis la esprimon « vortofrazo » (sed sonofrazo estus pli logika). Kvankam oni precipe studis tiun fenomenon en

la okcidentaj kulturoj tamen oni komencis studi ĝin por lingvoj sudamerikaj, nordamerikaj kaj aziaj, kaj proksimume la sama fenomeno ekzistas sur la tuta planedo. Ekde tiu pralingvo, la bebo iom post iom lernas la veran lingvon de la medio per du kompletigaj mekanismoj : unuaflanke, ĝi nomas la objektojn kaj per tio analizas la lingvon de la medio, duaflanke, ĝi konstruas sian propran lingvon, per sinteza procedo, kiu estis montrita de Chomsky (Ĉomski) kaj signas, ke ĉiu homo (ne nur la infanoj) kapablas, per limigita aro da vortoj, konstrui senliman nombron da frazoj.

Dum tiu lernado de la lingvo, ekzistas interesa etapo, kiam la frazo konsistas el du vortoj. Oni konstatas, ke la infanoj uzas du kategoriojn de vortoj. Kelkaj malmultaj vortoj de la unua kategorio (kaj nomataj « pivotoj ») montras la agojn, kiujn la infano aplikas al la aspektoj de la medio, aspektoj prezentitaj per multe da vortoj de la dua kategorio. Necesas substreki, ke tiu divido estas individua kaj ne respegulas la priskribon de la maturaj lingvoj fare de la individua kaj ne respegulas la priskribon de la maturaj lingvoj fare de la lingvistoj. (Leksemoj kaj morfemoj laŭ Martinet). En duvorta frazo estas ĝenerale pivoto kaj priskriba vorto, neniam du pivotoj, sed oni trovas foje du priskribajn vortojn. Tiuj du priskribiloj estas ligitaj aŭ per « kaj » aŭ per « al » aŭ « de » aŭ alia prepozicio loka « sur », « en »... En alia kazo, la du priskribiloj estas subjekto kaj objekto de la tradicia propozicio, sed mankas la verbo.

Oni skeme diris, ke la nombro de la vortoj en frazoj de infanoj egalas la nombron de la jaroj. Fakte ne ekzistas regula progresado. Post la duvorta frazo, kiu ĉiam ekzistas, venas miksaĵoj de frazoj unu-vortaj kaj du-vortaj, kaj oni speciale studis la situon de la verbo. Resume, ŝajnas ke, en la esprimo de la infano, la verbo venas post la subjekto kaj la objekto (aŭ adjekto). Ekzemple : « veturilosinjoro / sinjoro-purigas ». La infano unue nomas la videblajn estaĵojn kaj nur poste esprimas la ligon inter ili. Kaj tio okazas eĉ kiam en gepatra lingvo de la infano la verbo ne staras en la fino de la frazo. Oni povas rimarki. ke por kelkaj infanoj, estas rekta paso de la du-vorta frazo al frazoj tute korektaj laŭ la gramatiko de la plenkreskuloj.

Kelkaj kondiĉoj de tiu evoluo.

Paralele al la studo de la lingvaĵoj de infano, oni povas ekzameni la progresadon en la kompletigo de la nerva sistemo. Oni scias, ke kiam neŭronoj ne estas protektitaj de mjelina tegaĵo ili ne povas funkcii. Kaj tiu mjelino aperas iom post iom en la korpo de la feto kaj poste de la infano, kaj kelkaj partoj de la nerva sistemo ricevas sian mjelinon nur je la dek-sep-jara aĝo ! La babilo okazas kiam la nervaj konektoj estas tre primitivaj, la fenomeno estas loka. En la eholalia periodo ekzistas konektoj inter la aŭdaj partoj de la cerbo kaj la regionoj specialaj por la lingva kapablo. La surdaj infanoj mutiĝas ĉirkaŭ la aĝo ses-monata. Oni supozas, ke tio okazas, kiam aperas kutime la aŭda kontrolo de la parolo. Por permesi evoluon de la lingvokapablo ĉe tiaj infanoj oni devas uzi alian lingvon, per signoj, kiu kondukas, multe pli malfrue, al nova eduko de la parolo per aliaj kontroloj. Por tiaj surduloj poste reedukitaj, la gepatra lingvo estas la persigna lingvo, kaj la parola lingvo lernita poste estas la unua « fremda » lingvo.

Kiu povas uzi veran lingvon, krom la homo ?

Fosiliaj studoj.

La ekzisto de persignaj interŝanĝoj starigas la problemon de la limo inter la homaj lingvoj kaj la sistemoj uzeblaj kun simioj. Se oni serĉas la limon de la lingvoj en la evoluo, ne plu de individuo sed de la specioj, oni povas sin demandi de kiam la estaĵoj, kiuj situas inter simioj kaj homoj kapablas paroli. La problemo estas malfacila, ĉar la plej granda parto de la voĉa aparato malaperas post la morto, kaj ne estas trovebla ĉe la fosilioj. Ekde 1964 Leroi-Gourhan (Lerŭagura) opiniis, ke samtempe kiam estis iaj iloj uzataj en la homaj grupoj, tiam devis esti interparolado en tiuj grupoj. En 1977, tri serĉistoj studis sisteme la distancojn inter la elstarajoj de la bazo de kranio, kaj speciale la formon de la meza linio de tiu malsupro. Oni konsideras, ke por bone artikigi, necesas sufiĉan distancon inter la laringo kaj la palata volbo. Tiaj anatomiaj cirkonstancoj troviĝas nur ĉe la moderna homo (Homo sapiens). La antaŭa homo (Homo neanderthalensis) havis nur 90 % de la kapabloj de moderna homo, kaj la antikva « aŭstralopiteko » (Australopithecus) posedis nur 10 % de nia kapablo, kaj laŭ tiuj serĉoj ne kapablis paroli.

Dialogoj kun ĉimpanzoj.

Sed ĉu la simioj, kiuj ne kapablas paroli, povas interkompreniĝi kun homoj per signoj ? Oni multe eksperimentis pri tio, precipe kun ĉimpanzoj. Oni scias, ke en la naturo la ĉimpanzoj interkomunikas per signoj, kaj kiam unu eltrovas novajn signojn, tiuj signoj estas diskonigitaj en la grupon. Tial la serĉistoj instruis tutan sistemon de signoj al kelkaj ĉimpanzoj kaj sukcesis komuniki kun ili. Sed ĉu tio estas nur dresado, aŭ ĉu tio estas akiro de « vera » lingvo ? Oni sin demandis, ĉu ĉe la ĉimpanzoj ekzistas pli granda elvolviĝo de la maldekstra duono de cerbo, kiu karakterizas, ĉe la homo, la lingvajn centrojn ? Laŭ la nunaj mezuroj ŝajnas ke ne.

Alian studon faris Herbert Terrace en 1979 kun ĉimpanzo « Nim Chimpsky ». La serĉisto ne nur notis la progresojn de la ĉimpanzo, sed sisteme komparis kun infano. Ni jam vidis supre kiel progresas la infano ; se la vortojn oni devas lerni, la frazojn oni povas inventi laŭplaĉe, kaj tiu povo kreiva estas tipa trajto de la lingva kapablo. Kun Nim, iam oni rimarkis la aperon de frazo (per signoj), sed restudante tre atente la bildbendojn, la eksperimentisto konstatis, ke la reagoj de la ĉimpanzo akordiĝis kun tre malgrava signo (ne vola kaj ne konscia) de la instruanto. Tiam oni reviziis ĉiujn dokumentojn, ne nur pri Nim, sed ankaŭ pri aliaj ĉimpanzoj ; la nuna konkludo de Terrace estas, ke la ĉimpanzoj ne transiras la etapon de la du-vorta frazo. Kiam estas pli da vortoj, okazas nur ripetoj. Alia fakulo studinte la temon singardeme diras : « ĝis nun, oni ne sukcesis montri al la ĉimpanzoj, kiel oni povas uzi gramatikon », sed ne diras, ke tiu celo estas utopia.

Konklude, se oni difinas lingvon per parolo, oni povas diri, ke nur homo parolas ; se oni difinas ĝin per gramatika kreado de frazoj konstruitaj el signaro, ĝis nun oni povas atingi la saman konkludon. Nur la homo, ĉirkaŭ la aĝo trijara atingas tiun kapablon.

F. BOYET
(prelego - Grésillon 1981)

FERVOJA KONSTRUADO EN LA USONA OKCIDENTO

Bernard GOLDEN

Dum la 55 jaroj inter 1865 kaj 1920 la longo de relvojoj en 22 okcidentaj ŝtatoj de Usono pligrandiĝis preskaŭ kvindekoble je la meznombra proporcio de 4000 km. da trako en ĉiu jaro. Tiu etendiĝo de fervojlinioj ĉiam pli malproksimen en la sovaĝa okcidento rezultigis mallongiĝon de distancoj, ĉar la vojaĝtempo rimarkinde malpliiĝis.

Antaŭ la alveno de la « fera ĉevalo », kiel la indianoj nomis la lokomotivon, transportrimedoj en la Okcidento estis tre primitivaj. La indiĝenoj havis nek rajd- nek ŝarĝbestojn, kaj ili ne konis la principon de la rado. Ili migradis perpiede, portante siajn ŝarĝojn surdorse aŭ liganteilin al brancstangoj tiritaj de hundo. Ili translokiĝis ankaŭ per akvoveturiloj kiel pirogoj, kanuoj kaj bizonfelaj boatoj, kaj la fruaj esploristoj, bestkaptistoj kaj felkomercistoj uzis tiujn samajn rimedojn. Poste, la eŭropanoj konstruis diverstipajn pli grandajn boatojn por trafiki sur la navigeblaj riveroj. En tiu regiono, tamen, la akvovojoj neniam estis sufiĉe gravaj por anstataŭi la surterajn.

La hispanaj konkerantoj de la Nova Mondo alportis la ĉevalon kaj bovajn tirbestojn en la 16-a jc. Ili enkondukis ankaŭ simplan ĉaron tiritan de du bovoj, kiu cirkulis sur la ĉefvojoj de la Okcidento ĝis la meksika internlando. Dum la sekvaj jarcentoj la angleparolantaj pioniroj alvenis en ĉaregoj transportantaj homojn kaj varojn. Krom bovoj, ankaŭ azenoj kaj muloj estis jungitaj al tiaj ĉaregoj, kelkfoje organizitaj kiel karavanoj por pligrandigi la transport-kapaciton kaj ebligi longdistancajn veturojn. Por persona transporto estis uzataj kalesoj por 6 ĝis 12 pasaĝeroj.

Ĉar la vasta okcidenta regiono evoluis ekonomie tre rapide, neniu el la priskribitaj transportil-tipoj kapablis kontentigi la postulojn de pli kaj pli multenombraj bovbredistoj, terkultivistoj kaj ministoj, same kiel okcidenten migrantaj homoj kaj ankaŭ la armeo. Nova teknologia rimedo estis bezonata por pli efike kunligi produktejojn kun vendlokoj.

La historio de la konstruado de fervojlinioj en la okcidenta Usono estas epopeo plena de homa kuraĝo kaj riskemo, kun inĝeniaj teknikaj solvoj de plej grandaj malfacilaĵoj, sed ne mankis ankaŭ senbrida avareco kaj brutaleco. Estis malfacile, eĉ neeble, akordigi la kontraŭajn interesojn de la indianaj enloĝantoj, la posedantoj de bovrancoj, la ŝafbredistoj, la terkultivistoj kaj la fervojaj kompanioj. Ĉiu volis uzi la saman grundon propracele, do la fina decido estis farita de la plej fortaj ; la aliaj devis cedi, eĉ perei.

La usona registaro solvis gravan problemon de unu el la konfliktantaj partioj, donacante grandajn pecojn da tero al la kompanioj, kiuj entreprenis konstrui fervojajn liniojn en tiu sovaĝa teritorio. En la unuaj 12 jaroj, kiam okazis la komenco de la trakmetado, la fervojoj ricevis pli ol 56 milionojn da hektaroj, valorantaj proks. 280 milionojn da dolaroj.

Unue, la nevakaj terpecoj devis esti liberigitaj de siaj okupantoj, la indianoj. Poste, estis necese malhelpi la alvenon de paŝtiĝantaj bovoj en la proprietaĵo de la fervojoj. Tiel komenciĝis la cirkaŭbarado de la antaŭe libera gresejo. Tio okazigis ferocan opozicion ĉe la bovbredistoj, kiuj vidis, ke la agado de la fervojoj estis apogata de la usona registaro, la laŭleĝa posedanto de tiuj terenoj. Ju pli da fervojoj estis konstruitaj, des pli rapide ŝrumpis la areo de la ŝajne senlimaj paŝtejoj. La fervojaj kompanioj ankaŭ vendis je altaj prezoj terpecojn al enmigrantoj, kiuj siavice ĉirkaŭis siajn posedaĵojn per pikdrataj bariloj. Baldaŭ eksplodis sanga milito inter la fervojoj kaj la ranĉestroj, kiuj vane provis defendi sian tradician rajton de libera aliro al la gresejoj, sed tiuj ĉi fine konstatis, ke ne estas eble kontraŭstari al la loĝiga politiko de la federa registaro. En proks. 1890 finiĝis la epoko de la libera gresejo en la Okcidento, kaj samtempe malaperis la tradicia vivmaniero de la vakeroj.

La konstuo de pluraj lokaj fervojlinioj, kaj fine la grandaj transkontinentaj linioj, akcelis la priloĝadon de la vastaj okcidentaj terspacoj aliborde de la riversistemo Misisipo-Misuro. Granda parto de tiu laboro estis farita en la du jardekoj inter 1870 kaj 1890. Por transporti la amason da vojaĝantoj celantaj rapidan riĉiĝon en Kalifornio post la malkovro de oro tie en 1848, por evoluigi la kreskantan ekonomion de la okcidentaj regionoj, kaj por antaŭenigi la profitan komercon de la pacifika marbordo kun Azio, politikistoj de la atlantikaj marbordaj ŝta-

toj konstatis, ke estas bezonata transkontinenta fervojlinio liganta ambaŭ marbordojn. Ekonomikistoj prognozis ankaŭ, ke tiu linio efikos favore sur la ĝeneralan disvolviĝon de la parto de la lando inter la du finpunktoj.

En 1853 leĝo de la usona kongreso taskis al termezuraj ekspedicioj la esploradon kaj mezuradon de taŭgaj traceoj por eventuala konstruado de diversaj transkontinentaj fervojlinioj. Konforme al tiu leĝo, la unua el la transkontinentaj linioj estis planita en 1862 ; ĝi estis **Union Pacific,** ironta de Omaha Nebrasko, tra la prerio, dezerta regiono kaj Rokmontaro ĝis Pacifiko. Fakte, du fervojkompanioj partoprenis en tiu entrepreno. La konstruo de la vojo de Omaha al Promontory Point, Utaho (1851 km.) estis komencita de **Union Pacific** en 1864, kaj en 1865 **Central Pacific Railroad Company of California** ekmetis sian trakon, kondukantan de Sacramento, Kalifornio, ĝis Promontory Point (990 km.). Ambaŭ kompanioj konkuris por finkonstrui siajn partojn de la linio ; **Central Pacific** dungis ĉinajn laboristojn, dum irlandanoj laboris por **Union Pacific.** Per nitroglicerino ili malfermis kilometrajn longajn tunelojn tra montoj, kaj per lignaj konstruaĵoj transpontis profundajn abismojn.

Kiam en aprilo 1869 ambaŭ laboristaj grupoj alproksimiĝis al la renkontiĝpunkto, komenciĝis la legenda « trakmetada vetkonkurso ». La 29-an de aprilo 1869 ĉinaj fervojaj laboristoj de **Central Pacific** starigis nekredeblan rekordon de 16 km. da reloj metitaj en unu tago, kaj tiel ili gajnis la veton. La 10-an de majo samjare okazis la fama « Edziĝo de la Reloj ». Dum la ceremonio, ora relnajlego fiksis la lastan relon sur ŝpalo, kaj la fervojlinio de Omaha ĝis Sacramento (2841 km.) estis preta por trafiko. La longo de la unua transkontinenta linio estis entute 4505 km. de Nov-Jorko ĝis San-Francisko. Komence de la lasta jardeko de la 19-a jc. neniu ŝtato en la Okcidento estis sen fervoja kunligo kun ambaŭ marbordoj.

La kosto de la fervoja konstruado en la okcidenta parto de Usono estis granda, se mezurita laŭ dolaroj investitaj kaj elspezitaj, sed ĝi estis enorma, se kalkulita kiel la prezo pagita de la ĉirkaŭmedio kaj la homo. Dum jarcentoj, eĉ jarmiloj, gregoj da bizonoj provizis la indianojn per ilia ĉefa vivrimedo, ĉar la indiĝenoj ja sciis konservi ekologian ekvilibron en sia ĉirkaŭmedio. Tiu situacio estis subite detruita, kiam oni komencis konstrui la fervojojn. Por nutri la laboristojn, dungitaj ĉasistoj preskaŭ tute ekstermis la bizonon. Hodiaŭ ĝi estas protektita specio.

Ankaŭ la indianoj estis rigardataj tiutempe kiel speco de ĉasitaĵo. Ĉar ili obstrukcis la ekonomian ekspansion de la blankuloj, ili estis devigitaj formigri de siaj prapatraj terenoj. Se ili rezistis, la armeo militis kontraŭ ili kaj masakris ilin. En tiu fatala lasta jardeko de la pasinta jarcento, definitive finiĝis ankaŭ la epoko de libereco por la indianaj triboj, kiuj estis loĝigitaj en rezervejoj.

La solaj homoj, kiuj sukcesis uzi forton kontraŭ la fervojoj, estis la banditoj, kies aŭdacaj priraboj de vagonaroj formas alian ĉapitron en la Okcidento, sed ankaŭ ili malaperis frue en la 20-a jc.

Post pli ol cent jaroj ankoraŭ restas la pikdrataj bariloj kaj la relparoj. Ĉu por ĉiam ?

LA ARLESANINO

de Alphonse DAUDET (alfons dode)

Klarignoto : ARLESO (france : ARLES (arl) estas tipa kaj bela Urbo de Provenco, en la sud-orienta Francio ; ĝiajn loĝantojn oni nomas Arlesano kaj Arlesanino.

Por atingi la vilaĝon, deirante de mia muelejo, oni pasas antaŭ farmobieno konstruita apud la vojo, funde de granda korto plantita je mikrokukuloj. Tio estas la vera domo de la posedanta kulturisto provenca, kun siaj ruĝaj tegoloj, sia larĝa fasado bruna neregule truita kaj tutsupre, la ventindikilo sur la tegmento, la pulio por suprenporti la stakojn kaj kelkaj tufoj da bruna fojno, kiuj elstaras..

Kiel tiu domo antaŭe frapis miajn okulojn ? Kial tiu fermita portalo premis mian koron ? Mi ne kapablus klarigi tion kaj tamen tiu loĝejo emociis min. Ĉirkaŭe, tro da silento regis ...Kiam oni pasis, la hundoj ne bojis, la numidoj forflugis senbrue... Interne, neniu voĉo ! Nenio aŭdeblis, eĉ ne multintiloj... Nur la blankaj kurtenoj ĉe la fenestroj kaj la fumo, kiu eliris el la tegmento, montris, ke la loko estas enloĝata.

Hodiaŭ, ĉirkaŭ tagmeze, mi revenis de la vilaĝo kaj, por eviti la sunvarmon, mi paŝis laŭ la muroj de la domo, en la ombro de la mikrokukuloj... Survoje, antaŭ la pordo, nebruemaj servistoj finis ŝarĝi fojnoĉaron. La portalo restis larĝe malfermita. Mi ekrigardis pasante kaj, ĉe la fundo de la korto, mi distingis alkubutiĝinta — kun sia kapo en siaj manoj — sur larĝa tabloŝtono, altan maljunulon, tute blankbarban, surportantan tro mallongan jakon kaj disŝiritan pantalonon... Mi haltis... Unu el la viroj flustris al mi :

— Silentu ! Estas la mastro ; li estas tia ekde la malfeliĉo de sia filo.

Je tiu momento virino kaj juna knabo, nigre vestitaj, paŝis apud mi, kun dikaj meslibroj subbrake kaj eniris en la farmon.

La viro aldonis :

— ...La mastrino kaj Cadet (kade), kiuj revenas de la meso. Ili iras tien ĉiutage, de kiam la knabo sin mortigis. Ha ! Sinjoro ! Kia abomeno ! La patro ankoraŭ surmetas la vestaĵojn de l'mortinto, neeble persvadi lin demeti ilin. Hot ! bestoj.

La ĉaro ekmoviĝis por foriri. Mi, kiu deziris koni la tutan okazaĵon, petis de la veturigisto la permeson eksidi apud li kaj, supre, en la fojno, mi eksciis tiun korpreman historion.

Li nomiĝis Jan. Estis admirinda kamparano dudekjara, tiel saĝa kiel knabino, fortika kaj kun verama vizaĝo. Ĉar li estis tre bela. La virinoj lin rigardadis, sed li tenis nur unu en sia koro — juna Arlesanino tute velure kaj punte vestita, kiun li renkontis sur la promenejo en Arleso., iam — ĉe la farmo, oni senplezure konsideris tiun ligitecon ; la knabinon oni trovis koketa kaj ŝiaj gepatroj estis aliregionaj. Sed Jan postuiis sian Arlesaninon sendiskute. Li diris :

— Mi mortos se oni rifuzos ŝin al mi.

Fariĝis necese kliniĝi ; ilia geedziĝa festo estis decidita por post la rikolto.

Do, iun dimanĉan vesperon, en la korto de la farmo la familio finis siar manĝon ; estis preskaŭ geedziĝa manĝo. La fianĉino ne ĉeestis, sed oni abunde trinkis je ŝia sano. Iu viro montriĝas ĉe la pordo kaj per tremanta voĉo petas tion, paroli kun Mastro Estève (estev) nur kun li. Estève leviĝas kaj aliras al la vojo :

— Mastro, diras la viro, vi baldaŭ donos vian filon al friponino, kiu estis mia amatino du jarojn. Kion mi diras, mi pruvas. Jen leteroj. Ŝiaj gepatroj scias ĉion kaj promesis ŝin al mi ; sed de kiam via filo serĉas ŝin, nek ili nek ŝi konsentis renkonti min. Mi tamen, kredas, ke pro la pasinteco, ŝi ne povas esti la edzino de iu alia.

— Bone ! diris Mastro Esteve, post la legado de la leteroj ; venu trinki glason da muskatvino.

— La viro respondis :

— Dankon ! En mi estas pli da ĉagreno ol da soifo ! Kaj li iras for.

La patro revenas senemocie ; li denove okupas sian sidlokon kaj la manĝo finiĝas ĝojplene.

Tiun vesperon, Mastro Esteve kaj lia filo iris kune sur la kamparon ; ili restis longe ekstere ; kiam ili revenis, la patrino ankoraŭ atendis ilin.

— Edzino, diris la bienulo, kondukante sian filon, kisu lin, li estas malfeliĉa.

Jan ne plu aludis pri la Arlesanino. Li tamen amis ŝin ankoraŭ. kaj eĉ pli ol antaŭe, kiam oni montris ŝin al li, ĉirkaŭbrakita de alia viro ; sed li estis tro fiera por diri ion ajn ; tio estis la kaŭzo de la morto de tiu kompatinda knabo !... Kelkfoje, li pasigis tutajn tagojn senmove en angulo. Alifoje, li sin dediĉis al la tero kun granda vigleco kaj tute sola plenumis pli da laborajo ol dek taglaboristoj. Vespere, li iris al Arleso kaj paŝis ĝis li vidis en la subiranta sunlumo la fajnajn sonorilturojn de la urbo. Poste, li revenis. Neniam, li iris pli malproksimen.

Vidante lin tia, ĉiam malgaja kaj sola, la familio ne plu sciis, kion fari Oni timegis malfeliĉon. Iafoje, lia patrino, rigardante lin, tra larmoplenaj okuloj, diris :

— Nu, aŭskultu. Jan, se tamen, vi volas ŝin, edzinigu, ni donos ŝin al vi.

La patro, ruĝa pro honto mallevis sian kapon.

Jan signis ne kaj eliris.

Ek de tiu tago. li ŝanĝis sian vivmanieron, ĉiam montrante sin gaja por trankviligi siajn gepatrojn. Oni revidis lin ĉe la dancejo, en la trinkejo, en la Festo pri la Junaj Virbovoj, ĉe Fonvieille (fonviej) li mem gvidis la farandoloĵn.

La patro diris : « Li resaniĝis ». La patrino daŭre timis kaj pli ol antaŭe zorgis pri sia filo... Jan transnoktis kun Cadet tutapude de la silkraŭpejo ; la kompatinda patrino alportigis liton por si mem apus ilia dormoĉambro... Dumnokte, la raŭpoj povus eventuale bezoni ŝian helpon.

Okazis la festotago de Sankta Elojo, patrono de la bienuloj.

Granda festo en la farmodomo. Al ĉiuj oni verŝis vinon « Chateauneuf » (ŝatonöf : Kastelo nova) kaj kuiritan vinon, kvazaŭ pluvegus. Poste, petardoj, fajroj sur la draŝejo, kolorlanternoj en la brancaro de la mikrokukuloj. Vivu Sankta Elojo !... Oni ĝissate farandolis, Cadet bruldifektis sian novan bluzon. Jan mem aspektis kontenta ; li deziris dancigi sian patrinon ; la kompatinda virino ploris pro feliĉo.

Noktomeze, ĉiuj enlitiĝis, ĉar ili bezonis dormi. Jan ne dormis ; Cadet nur poste rakontis, ke la tutan nokton li pasigis plorante. Ha ! Mi povas certigi ja, ke li estis vere enamiĝinta !...

Je la morgaŭa ektagiĝo, la patrino aŭdis iun, kiu trakuras ŝian dormoĉambron. Ŝi ekhavis kvazaŭan antaŭsenton :

— Jan, ĉu estas vi ?

Jan ne respondis, li supreniris jam la ŝtuparon. Tut rapide, lia patrino ellitiĝis :

— Jan, kien vi iras ?

Li aliras al la subtegmento ; ŝi sekvas lin.

— Filo mia, je l'nomo de l'ĉielo !...

Li riglas la pordon.

— Jan, Jaĉjo mia, respondu ; kion vi faras ?

Blindopalpe, ŝiaj maljunaj manoj tremantaj serĉas la klinkon. Fenestro malfermiĝas, bruo de korpo falanta sur la pavimon de la korto, finite !..

La kompatinda knabo diris al si Mi tro amas ŝin... mi malaperas ! Ha ! Kiajn mizerajn korojn ni havas. Nekomprenebie, malestimo ne povas forigi amon !...

Tiun matenon, la vilaĝanoj sin demandis, kiu povas kriegi tiamaniere en la direkto de la farmodomo Estève.

Tio okazis en la korto, antaŭ la tabloŝtono kovrita de roso kaj sango ; tute nuda patrino lamentegis, kun sia senviva filo sur siaj brakoj.

Elfrancigis André Ribot.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	T	E	L	E	F	O	N	A	D	I
2	R	U	A	N	A	■	A	R	U	M
3	I	■	R	■	U	■	S	T	E	P
4	K	O	M	U	N	I	K	I	L	O
5	I	K	O	N	O	■	I	K	O	R
6	S	■	J	U	■	A	Ĝ	O	■	T
7	T	I	■	E	B	L	■	L	I	A
8	I	N	O	C	E	N	T	O	■	D
9	N	A	P	O	L	E	O	N	■	■
10	O	R	O	■	A	R	N	■	N	E

Tiu problemo enhavis eraron : la kvadrato H 6 — V 1 estis nigra, sed ĝi devus esti blanka kiel montras la solvo. Bonvolu senkulpigi nin.

NOVAJ PROBLEMOJ :

Besto ĝis homo :

Vi rajtas ŝanĝi nur unu literon ĉiufoje kaj forstreki nur la literon « s ».


Tiel, ekzemple, besto iĝas kesto aŭ beto. Daŭrigante tiujn ŝanĝojn, vi devas atingi la vorton « homo ». La solvo kiun ni eldonos en la venonta numero entenos 11 eblecojn.

Lado ĝis pomo :

Vi uzu la saman metodon kiel por antaŭa problemo, ŝanĝante nur unu literon ĉiufoje. La solvo entenos 4 eblecojn.



KRUCVORTOJ (PROPONITAJ DE S-RO PARISOT) :



(R) = nur radiko

Horizontale :

1 — Grava kunveno.
2 — Kolekto — El la koro.
3 — Distinginda.
4 — Pasiva sufikso — Kiamaniere ?
5 — Numeralo — Interne — Altvalora metalo.
6 — Burleskaĵo.
7 — Kopii (R) — Li kaj ŝi (plurale).
8 — Ino de sovaĝa kuniklo.
9 — El la metalo de la H 5-3 — Temanta pri amo... aŭ amoro (R).
10 — Flankenŝoviĝo de aŭto — Nedefinita pronomo.

Vertikale :

1 — Florburĝonoj uzataj en kuirarto.
2 — Kovri per valora metalo — Senfenestra ĉambreto.
3 — Signi per vorto — Rebonigi (R).
4 — Signo, pruvo.
5 — La televido estas la malgranda... — Prefikso.
6 — Ŝtonego (R) — Frukto.
7 — Malalta arbeto (R) — Sufikso.
8 — Nulo — Kompanio.
9 — Haŭttavolo — Sufikso.
10 — Ebena fermita kurbo — Incitete piketi.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

KOMPARADO

Pli ol- malpli ol : li estas pli stulta ol malica — li ne vivos pli ol unu tagon- li iris pli kaj pli profunden — la fluo fariĝis malpli kaj malpli forta- tio ĉi estas malpli ol ni esperis.

Tiel, kiel : li estas tiel forta, kiel mi — elparolu tiel, kiel oni montris al vi.

Same kiel : via libro estas la sama, kiel la mia. ili rakontis la akcidenton same, kiel ni.

Tiom, kiom : vi faras por esperanto tiom, kiom vi volas.
li pagis tiom, kiom vi petis.

Tiam, kiam : mi skribos tiun leteron nur tiam, kiam vi estos ĉi tie.

Ju pli, des pli : ju pli oni posedas, despli oni avidas.

Ekscesaj decibeloj :



Sufiĉas ! Tiam, kiam mi esperas dormi, vi funkciigas vian radio-aparaton kaj ĝiaj « rock and roll » -dancoj tremigas la teron, tiel, kiel tertremo kaj plenigas la ĉielon same kiel kriaĉoj de demonoj.

Logika vidpunkto :



— Mi bedaŭras, Sinjoro, sed tiu letero estas tro peza ; ĉar vi devas pagi tiom, kiom estas postulata, vi devas aldoni pluan poŝtmarkon.

— Sed, nu, ĝi estos ankoraŭ pli peza !

Mistera psikologio :



— Mi estas furioza ! ĉu vi legis la kritikon de S-ro Gundo kontraŭ mia lasta libro ?

— Ne turmentiĝu ; Tiu recenzisto havas neniun personan opinion ; li nur ripetas tion, kion diras la aliuloj. Cetere, ju pli aĉe oni kritikas verkiston, des pli furora ĝi iĝas.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - 5 (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (8000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (22 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (12 us. dol.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1981, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le trentième été de la Maison Culturelle est terminé. Qu'en dire ? Les deux premiers stages ont affiché « complet », le troisième ayant été moins fréquenté surtout pendant la dernière semaine comme d'habitude. Succès des conférences, des cours, des autres activités. En somme une année comme les autres, semble-t-il. Le compte d'exploitation provisoire qui sera présenté à la réunion du Conseil d'Administration en octobre, nous donnera des indications sur les résultats financiers. Mais il apparait déjà que l'augmentation des prix alimentaires et des salaires pendant les douze derniers mois a dépassé l'augmentation des tarifs que nous avions décidée pour cette année. Il nous faudra en tirer les conséquences pour 1982.

Un des aspects agréables de la vie à Grésillon en été est l'atmosphère amicale qui y règne. Elle est due en partie au fait que des contacts privilégiés s'établissent. Elle est due également à la liberté dont jouissent les stagiaires. Pensant que la vie en commun doit s'appuyer sur une discipline personnelle, chacun devant être capable de connaitre les limites de sa propre liberté, les responsables de la M.C.E. ont toujours évité tout réglement stricte. Nous n'aimons pas interdire, chacun devant savoir éventuelement s'interdire de faire ceci ou cela, le respect des autres devant remplacer les panneaux restrictifs de liberté. Au début de chaque stage, après avoir donné les renseignements pratiques, le responsable ne signale que deux impératifs : nécessité d'être à l'heure aux repas et respect du sommeil des autres à partir de 23 heures. Pour le reste, à chacun de se fixer la limite au-delà de laquelle il risque de gêner les autres. Une difficulté se présente cependant de plus en plus : les arrivées échelonnées au cours des stages qui obligeraient à répéter chaque jour les mêmes choses et qui perturbent les cours, surtout celui des débutants.

Cette politique n'est pas sans danger car tout le monde n'est pas prêt à mener une vie communautaire et à dominer sa liberté. Nous sommes heureux que chacun se sente « chez lui ». Il ne faudrait pas que certains agissent comme chez eux. C'est une tendance qui se développe un peu : on monte des verres, des cuillères dans la chambre sans prévenir et on oublie de les descendre ; on se sert de matériel avec ou sans autorisatoin et on ne le remet pas en place ; on entreprend des travaux, on fait des installations dans sa chambre sans rien dire alors que des travaux gênants pourraient devenir utiles après un rien de concertation ; on se sert d'un appareil, on le détériore (cela arrive à tout le monde !) mais on oublie d'en informer le responsable qui pense toujours avoir un matériel fiable sous la main ; on se sert soi-même dans le frigidaire, dans la cave en l'absence des responsables ; on entre et on sort du bureau avec désinvolture, sans frapper, parfois sans saluer ; on cueille pour soi les fruits qui sont destinés à la collectivité...

Sous un certain jour on peut considérer que cela est réconfortant car ainsi la démonstration est faite que les esperantistes sont comme tous les autres touristes en tout lieu de vacances. Il est évident que ces faits ne concernent qu'un petit nombre de personnes au demeurant sympathiques. Il n'est sans doute pas grave que l'ont « feinte » Grésillon en prenant deux ou trois douches pour le prix d'une, en se faisant préparer deux repas au lieu d'un seul en s'adressant à deux personnes différentes, en arrivant un matin sans prévenir, et en partant après avoir pris un petit déjeuner gratuit. Mais ce qui nous ennuie tous c'est que nous faisons confiance à priori et que nous sommes parfois déçus. Faut-il afficher un nouveau slogan « Grésillon, la Maison de tous mais pas de chacun » ?

P. BABIN.

INTER NI

La 30-a somero de la Esperanto-Domo finiĝis. Kion diri ? La unuaj du periodoj funkciis kun neniu ĉambro libera. La tria estis malpli plena ĉefe dum la lasta semajno, kiel kutime. Ankaŭ kiel kutime prelegoj, kursoj, aliaj aktivaĵoj ricevis sukceson. Konklude, somero simila je la antaŭaj. La provizoraj kontoj prezentotaj dum la venonta kunveno de la Konsilio donos informojn pri la financaj rezultoj. Jam montriĝas, ke la diversaj prezoaltiĝoj dum lastaj dek du monatoj superis la altigon de la tarifoj, kiun ni decidis por 1981. La konsilio tiros la konkludon por 1982.

Unu el la agrablaj aspektoj de la grezijona vivo dum la somero estas la amika etoso. Ĝi devenas parte de la privilegiaj kontaktoj. Ĝi devenas ankaŭ de la libereco, kiun oni trovas tie. La respondulo j de la Esperanto-Domo pensas, ke komuna vivo eblas nur helpe de mem disciplino ; ĉiu estu kapabla koni la limojn de sia propra libereco. Pro tio ek de la komenco ni ĉiam rifuzis starigi ian reglamenton. Ni ne volas malpermesi, ĉar ĉiu povas eventuale malpermesi al si fari ion ; la respekto al la aliaj devas anstataŭi la panelojn limigantajn la liberecon. La unuan vesperon de ĉiu periodo, post ĝenerala informado, la respondulo donas nur du kvazaŭ ordonojn : ĉiuj venu akurate al la manĝoĉambro kaj respektu la dormon de la aliaj post la 11-a vespere. Por la ceteraj eroj de la komuna vivo ĉiu devas trovi la limon trans kiu lia libereco riskas ĝeni tiun de la aliajn kaj la normalan funkcion de la Domo.

Tia politiko ne estas sendanĝera. Ne ĉiu estas preta vivi kun multaj aliaj homoj. Ne ĉiu kapablas regi sian libero-deziron. Multe plezurigas nin, ke ĉiu sentas sin hejme en Grésillon, sed kelkaj agas, kiel ili agus hejme. Tiu tendenco iom disvastiĝas : oni kunportas al la ĉambro glasojn, kulerojn senaverte kaj oni forgesas reporti ilin poste almenaŭ ĝis la fino de la periodo ; oni uzas ilojn kun aŭ sen permeso kaj oni ne remetas ilin en la ĝusta loko ; oni faras « laborojn » propradecide, kiuj estas ĝenaj, kiam nura interkonsento povus igi ilin utilaj ; oni « personigas » sian ĉambron gluante sur la muroj, aferojn kiuj difektas la paperon aŭ la farbon ; oni uzas aparaton, kiun oni difektas sed oni forgesas averti la respondulon kiu daŭre kredas, ke li povas fidi ĝin ; oni sin-mem servas el la fridujo aŭ la kelo dum la foresto de la respondulo j ; oni eniras kaj eliras el la oficejo ne sin anoncante eĉ ne salutante por preni « ion » ; oni kolektas por si mem la fruktojn destinitajn al la vespermanĝo de ĉiuj...

Tiuj faktoj montras, ke la esperantistoj estas ordinaraj homoj kiuj reagas, kiel aliaj feriantoj en aliaj lokoj. Temas kompreneble pri tre malgranda nombro da homoj aliflanke simpatiaj. Ne tre gravas ke oni ruzas kontraŭ Gresillon havigante al si du malvarmajn manĝojn anstataŭ unu per peto al du personoj ; uzante la duŝejon por pluraj personoj per pago de nur unu duŝo ; alvenante matene senaverte, havante matenmanĝon kaj forirante ne paginte. Sed tio genas nin ĉar ni apriore fidas ĉiujn kaj iam elreviĝas. Eble estas necese meti ĉe la enirejo panelon bonvenigan : Bonvenon en Grésillon, la Domo de ĉiuj sed ne de ĉiu.

Nos peines

Bien connu de tous les esperantistes, en particulier du G.E.E., ami de la première heure de la Maison Culturelle, Gontran Debande nous a quittés. A sa femme, nous présentons nos condoléances les plus amicales.

Nos joies

Le 28 septembre dernier est né Pierre Babin. Nous sommes heureux de féliciter les parents, Nicole et Dominique Babin et les grands-parents Luce et Pierre Babin. Nous tenons aussi à souhaiter la bienvenue à Pierre, un futur grésillonais, évidemment !

APPEL

Notre revue connait, et elle n'est pas la seule, des difficultés. Vous pouvez nous aider à les résoudre en payant régulièrement vos abonnements et en faisant abonner vos amis. Une autre manière de nous aider à faire le point serait de répondre aux questions suivantes :

— La revue vous intéresse-t-elle sous sa forme actuelle ?
— Quels articles lisez-vous de préférence ?
— Qu'aimeriez-vous y trouver ?

Nous tiendrons compte non seulement du contenu des réponses **mais aussi de leur nombre.** Cet aspect nous aidera à déterminer l'avenir de Kulturaj Kajeroj.

Adresser vos réponses à :

Jean-Paul GUILLOT
21. rue des Aubépines — 86000 POITIERS

Merci !

LIBRO -- SERVO

ATENTU : sendu mendon kaj ĉekon al :

Maison Culturelle Espérantiste

49150 BAUGÉ

C.C.P. Nantes 1485 39 P

NOTRE CATALOGUE (suite)

TEATRO :

Amo de Danto Alighieri (La) (Müller) historia dramo	31,00
Fatomaŝino (La) (J. Cocteau-trad. Lagrange) Iom parodia prezento de la sorto de Edipo	30,00
Gajaj klubversperoj (G. Riisberg) por klubaj kunvenoj	7,00
Hamleto (Shakespeare) traduko de Newell	28,00
Hamleto («) traduko de Zamenhof	25,00
Jolanto (H. Hertz) historia dramo	5,00
Justuloj (La) (A. Camus- trad. Lagrange) filozofia dramo	18,00
Mokindaj Preciozulinoj (La) (Molière) satiro kontraŭ afektismo	5,00
Natan la Saĝulo (Lessing) klasika drama poemo	6,00
Ni aktoras (Boulton) ekzercmaterialo por daŭrigaj kursoj	8,00
Sen Elиro — La respektema p... (Sartre) dramoj ekzistadismaj	15,00
Tragedio de l'Homo (J. Madach) alegoria drama poemo	25,00
Virino ĉe la landlimo (M. Boulton) drametoj kaj skeĉoj	25,00

POEZIO :

Arĉoj (Mattos) sonetoj originale verkitaj	15,00
Cigana romancaro (Garcia Lorca) pure hispana sed universale aklamita	15,00
Dudek kvar sonetoj (L. Labbé) el renesenca franca literaturo	28,00
Duonvoĉe (Maura) originale verkita	15,00
Elektitaj fabloj de Krilov	50,00
Fajro sur mia lango (de Kock) originala poemaro	15,00
Gaja forĝisto (La) (H. Schmidt) humuraj simplaj	12,00
Humoroj (Auld) pri vakuo de la homa vivo	15,00
Himeroj (de Nerval) du-lingva eldono	30,00
Infana raso (La) (Auld) longa originala poemo pri la rolo de la homaro	25,00
Infero (D. Alighieri) ilustrita	55,00
Kalipoeg — estona popola eposo	10,00
Kantoj kaj romancoj (Heine)	40,00
Libro de Amo (P. Peneter) amortema kaj erotika	45,00
Malmalice (J. Valano)	20,00
Martin Fiero (Hernandez) la eposo de la argentinanoj	45,00
Modesta bukedo (Jost) prozo kaj poemoj	16,00
Ni devas vivi (Walraamoen kaj Gabrielli)	25,00
Norda naturo (H. Dresen) observemo kaj natursimpatio	16,00
Nova ezopo (S. Urban) spritaj originale vertikaj fabloj	16,00
Nur tri koloroj (Urbanova) pasiaj originalaj poemoj	16,00
Primico (R. Tagor) kvindek poemoj de la bengala poeto	25,00
Provo alfronti la vivon (Georgiev) originalaĵoj	16,00
Renesenca periodo (La) francaj poemoj de la 16-a jarcento - dulingva	45,00
Stranga butiko (Schwartz) gaja satira poemaro	24,00
Sen parasuto (Thorsen) tradukaĵoj kaj originalaĵoj	16,00
Sileziaj kantoj (Berzruĉ)	30,00
Soifo (Tarkony) originala poemaro	20,00
Sub stelo rigida (fra Hamri) traduko de isiandaj poemoj	16,00
Sur la vivovojo (A. Logvin) originalaj poemoj	16,00
Trofeoj (La) (J.M. de Heredia) la franca parnasismo	30,00
Verdkata testamento (Schwartz) humura poemaro	28,00
Vesperkanto (Adamson) pasiaj originalaj poemoj	16,00
Vivendo (L. Gabrielli) originalaj poemoj	35,00
Vajo kaj vorto (Nogueira) poemoj originalaj kaj tradukitaj	20,00

FAKOJ DIVERSAJ :

ABZ de amo (Hegeler) enciklopedio pri la seksa vivo	70,00
De parizo al Pireneoj (Retot) turismo	5,00
Dolĉa Franclando (La) (Delaire) en rakonta stilo	40,00
El la polvo de la Tero (Rolt) pri agrokulturo	22,00
Gvidlibro tra Parizo (Julieta) kun sugestoj por promenoj	20,00
Homaranismo de L.L. Zamenhof (van Kleef)	7,00
Internacia kuirlibro 500 receptoj el 100 landoj	28,00
Kunprinclando Andoro (La) (Barquer) ilustrita	10,00
Loire Kasteloj (Retot) turismo	5,00
Nobla Korano (La) plena traduko kun paralela originala araba teksto	160,00
Retoriko (Lapenna) science redaktita	60,00
Sankta Biblio (La) malnova kaj nova testamentoj	70,00
Senĝenaj dialogoj (Fernandez) popularscienca esploro de fundamentaj demandoj	42,00

DIVERSAJOJ :

Danĝera ul' (J. Le Puil) kaseto kun tekstlibreto	40,00
Elektitaj eroj de N. Rytjkov (disko)	45,00
El la poezio de Baghy deklamado	16,00
Esperanto kantas Carrouges disko 17,50	18,00
Instruamuzo (marĉek-markovic) 1-a kaj 2-a volumoj	15,00 (la vol.)
Tra l'Mondo (O. Tzaut) disko 30 cm. stereofonia	52,00
« Kasedo	52,00

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	1,00
couleur	:	1,20
Cuillères de collection	:	25,00
Pendentifs	:	20,00
Porte-clés	:	20,00
Coupe-papier	:	35,00
Thermomètres voitures	:	35,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	4,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 80 Fr.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

PAŜOJ AL PLENA POSEDO

(4e édition)

de **William AULD**